



*Eltiro el Estrara Komunikado EKO 2016-19 sendita el Budapeŝto, la 15an de julio.*

## AMO 26 – abundo da vidbende registritaj rezultoj

La 26a Seminario por Aktivula Maturigo (AMO) sukcese okazis fine de junio en Herrera del Duque en okcidenta Hispanio. Jen ligo al la retejo pri la seminario, pli precize el la Inaŭguro de Seminario por Aktivula Maturigo, okazinta paralele kun la 75a Hispana E-Kongreso.



<https://youtu.be/0WEtyHw9MAo>

(14 minutoj)

En tiu paĝaro vi trovos dekon da pliaj vidbendoj pri AMO 26, la kongreso kaj aliaj agadoj de HEF.

*Foto: Jose Antonio del Barrio parolas dum la inaŭguro de la seminario.*

Kelkajn pliajn ligojn ni donas sube al pliaj Amaĵoj. Jen pliaj rezultoj el la seminario.

### Bonaj praktikoj kaj ekzemploj

- Hispana Esperanto-Federacio: AMO-seminario parte paralela al pli granda aranĝo, kun diversaj metodoj (prelegoj, trejnadaj, atelieroj) laŭ la celgrupo.
- HEF: kvalite filmi la sesiojn de la AMO-seminario, tiel ke ili estu disponeblaj kaj alireblaj.
- HEF: aktive engaĝi membrojn (kaj kongresanojn) en la prilaborado de informiloj de la asocio
- Ekzemploj pri sukcesa agado de HEF:
  - starigo kaj valorigo de la bitbilioleto de HEF, kunlabore kun la hispana Ministerio pri Kulturo kaj kadre de Europeana, granda virtuala biblioteko)
  - lige al tio, la publikigo (kun bonaj eĥoj) de la esperanta eldono de “Don Quijote de la Mancha” en bita formato
- Madrida Esperanto-Liceo (MEL): aranĝi profesie kulturajn aranĝojn por la loka loĝantaro, rekomendinde en kunlaboro kun aliaj kulturaj organizaĵoj.
- Hispana Esperanto-Junulara Societo (HEJS): engaĝi membrojn pri la desegnado kaj elekto de la logotipo de la asocio.
- Varsovia Vento: aktivigo de kurslernintoj pere de la kreado de ebloj por kunlaboro (kunlaboro kun la redakcio de la radio VV, kreado de podkasto, organizado de eventoj, ktp.).

## Rekomendoj

- Malferma defio: efike allogi Duolingo-lernantojn.
- Diskonigado de ideoj kaj projektoj ene de nia komunumo, tiel ke ni ne reinventu la radon ĉiufoje.
- Instigi pli da trejnsesioj/ekzercoj je loka/nacia nivelo pri informado (ekzemple, pri plilaborado de informiloj, logotipoj, ktp).
- Dum informa agado, laŭeble koni la publikon/celgrupon por plej efike aliri ĝin.
- Eviti tro agresemajn kaj kritikemajn argumentojn (ĉefe pri la uzado de aliaj lingvoj en internaciaj kunteksto, ekzemple de la angla) kiam oni alparolas homojn por informi ilin pri Esperanto
- Pliefikigi kaj la internan kaj la aleksteran informadon kaj komunikadon per kiom eble plej diversaj kanaloj (podkasto, Youtube, sociaj retejoj, ktp.)
- Konsciigi kaj konsciigi pri la valoro de niaj kulturaj atingoj
- Maksimumigi la produktojn de nia kultura agado por informadaj celoj (originala literaturo, tradukita literaturo, muziko, inkluzive kantojn por infanoj, kaj originalajn kaj tradukitajn)
- Plifortigi agadon por riĉigi Vikipedion kaj daŭre plibonigi la kvaliton de ties kontribuoj
- Strebi akiri la subtenon de publikaj lokaj kaj naciaj instancoj
- Antaŭenigi la agnoskon kaj la akreditigon de la KER-diplomoj de Esperanto kaj per iniciatoj ĉe universitatoj kaj lernejoj kaj kadre de la du internaciaj retoj pri lingvotestado kaj lingvoinstruado ALTE kaj ACLES.

Duncan Charters prelegas dum 45 minutoj pri "Kiel paroli publike kaj kiel alfronti antaŭjuĝojn pri Esperanto" en la 26a Seminario por Aktivula Maturigo, organizita de UEA kaj Hispana Esperanto-Federacio:

<https://youtu.be/E4VAExkDcmc>

Liven Dek (Miguel Gutiérrez Aduriz) parolas dum 26 minutoj pri la evoluo de multaj bone konataj internaciaj emblemoj, kaj demandas sin pri (mal)oportuneco de la esperantaj emblemoj.

<https://youtu.be/KcbQR1iXdnw>

Vortoj: 525 vortoj